Ĉe amantoj de la belo, «KVAROPO» vekas la plej ardan entuziasmon. Esperanto atingis senmortecon per tiaj belaj gemoj, jarmilojn traborantaj. Kiel recenzi ĝin? Mi ja dezirus represi tie ĉi la tutan volumon, eĉ la antaŭparolon de Waringhien; sed tio ne estas ebla: mi havas nur spaceton por uzi en la revuo kaj dekoj da libroj atendas en vico!

Ĉiuj poemoj en la libro al mi plaĉas, sed mi devas elekti iun por mencii... Jen la bela prediko *Magdalena*, de Pastro John S. Dinwoodie. Oni bele kantas en majesta katedralo dum tre proksime, en mizera strataĉo, mor-

Recenzo

tas malpura pekulino en profunda timo. Ŝi ĝemas:

*«Tiom malpuras en mi la animo...
La tuta akvo de la mondo vasta
ne povus repurigi ĝin...
Malpura kvazaŭ lepro...»*

Tamen ŝin faris tia ne ŝi mem, sed la medio. Ŝi daŭrigas siajn plorojn:

*«En peko koncipite, mi naskiĝis
en fironдон
de ŝtelistoj kaj publikulinoj...»*

Ne ŝi kulpas, sed la socio, kiu neniam helpis ŝin; nur juĝis kaj kondamnis ŝin pro pekoj de la gepatroj. La socio ja kondamnis ŝin al tia mizera vivo. Ŝi estas nur kompatinda viktimo...

La pastro kaj poeto revenas en la majestan katedralon por akuzi la piulojn:

*«Aŭskultu, ho vi adorantaj Dion!
Li, kiu kreis vin kaj kreis ĉion,
al via voko kaj ador' atentos
kaj al vi, lin serĉantaj, sin prezentos
en via homfarita, tera templo,
nur se vi vivos laŭ la Kristekzemplo,
montrante al malfeliĉuloj amon,
kaj atendante helpopretan manon.
Vanas la voko, vanas la adoro,
se tia amo mankas al la koro!»*

Tiu prediko estas dividita en 7 partojn kaj okupas 8 paĝojn de la volumo. Pro la grandiozeco de la doktrino kaj la beleco de la versoj, ĝi ne povos morti: ĝi eternigos la lingvon, kiu ĝin prezentas al la homoj.

Se inspirita pastro bele predikas en tiu poemo, en alia, scienculo instruas al ni kosmogonion. «*La Kosmo*», de John Francis, plenigas 14 paĝojn de la volumo, kaj en kvin ĉapitroj instruas nin per belaj versoj pri: I. La Komenco; II. La Kreo de la Mondo; III. La Evoluo de la Mondo; IV. La Morto de la Mondo; V. La Fino.

Memkompreneble, scienco ne estas eterna kiel religio; tute kontraŭe, ĝi ŝanĝas ofte siajn konceptojn. En pasintaj jarmiloj la konvinkoj pri la kreo de la mondo neniel similis la niajn, kiujn la poeto fiksas en siaj versoj. Post jarmiloj novaj eltrovoj nuligos la nunan kosmogonion, sed la belajn versojn de John Francis neniam eltrovo povos nuligi: same kiel la versoj de Homero, ili restos ĉiam kaj estos pli kaj pli ŝatataj. Ni aludis nur du el la steloj kaj la spaco jam finiĝas.

Ni atentu pri la fakto, ke tiuj gemoj estas *originale* verkitaj en Esperanto; tiuj junaj poetoj pensas kaj redaktas rekte en idiomo de la homaro siajn versojn; Esperanto estas ilia poezia instrumento. La lingvo estas sufiĉe ellaborita por altaj flugoj super Parnaso kaj tiuj junuloj mastras ĝin. Se per bonaj tradukoj ni alproprigas al ni ĉiujn trezorojn de la pasinteco, per originalaj majstroverkoj niaj talentuloj konstruas la unuecigan kulturon de la estonteco. Se la unueciga forto de unu nacia literaturo kreas la nacian spiriton de unu popolo, tiu sama forto per nia originala literaturo kreas la homaran spiriton de la estonteco.

La unuaj esperantistoj povis nur traduki en Esperanton, ĉar tiam ne ekzistis sufiĉe da libroj por ĝisfunda mastrigo de la lingvo kaj ĉi tiu mem ne estis plene ellaborita. La talentaj tradukantoj ellaboris la lingvon kaj kreis sufiĉan literaturon por ĝia ellernado.

Nun komenciĝas nova epoko: naskiĝas la mondliteraturo en prozo kaj verso. Ekaperas talentaj verkistoj kaj oratoroj plene mastrantaj la lingvon. Esperantujo proklamas sian memstaran sendependecon kaj ekgvidas la homaron al brila estonteco.

Tiun ĉi libron oni studu atente de la komenco ĝis la fino, kiel ni nun faras en niaj kulturkunvenoj, kaj retralegu hejme de tempo al tempo por denove ĝui delikatan spiritan plezuron. Tiajn verkojn oni devas parkere scii por ilin ĉiam ĝui.

Ĝin posedi kaj ofte relegi estas privilegio de la favoratoj de la dioj, de la progresemaĵoj esperantistoj.

Klemenx Wieczorek — KIEL AŬTODIDAKTO AL PEDAGOGIA SCIENCO — Komisiita Eldonejo: Limburger Vereinsdruckerei GmbH., Limburg/Lahn, Germanujo, Broŝ. 39 p. 15 x 21. Prezo nemontrita.

Dank'al longaj linioj kaj malgrandaj literoj, estas multe da teksto sur tiuj 39 paĝoj. La verko estas pure scienca, en bona lingvo, kaj studas la historion de pedagogio ekde la tempo de Platono kaj Sokrato ĝis nun. Estas apartaj ĉapitroj pri *La etiko de Platon, Aristoteles, lernanto de Platon, Come-*

nius kiel edukanto, Jean Jacques Rousseau, La pedagogiaj intuicioj de Pestalozzi, Jean Paul, Humboldt, Friedrich August Wolf, Esperanto kiel informilo k.a.

La aŭtoro antaŭvidas la grandan kaj utilan transformadon, kiun Esperanto faros en pedagogio, ĝin liberigonte de multaj baroj kaj antaŭjuĝoj diversspecaj. Entute la libro estas tre interesa, sed la aŭtoro mortis en 1947, antaŭ ol finpretigi sian verkon kaj oni eldonis senrevizie liajn manuskriptojn; tial aperas pluraj ripetoj, kiujn certe li forigus, se li estus polurinta sian verkon. Ekzemple, sur paĝo 24 oni legas:

«*Esperanto ne estas malamiko de la humana eduko, car humaneco estas certa informilo por la spirithistoria mondo, kaj kiel ĉefparto de eduko spirita ĝi restos por ĉiam*».

En la paĝo 29 oni legas:

«*Malamiko de la humana eduko Esperanto ne estas. Humaneco estas certa informilo por la spirithistoria mondo, kaj ĉefparto de la spirita eduko ĝi estas ĉiam*».

Tiaj ripetoj kaj malĝustaĵoj montras, ke oni devus esti polurinta la manuskripton antaŭ ol presi ĝin.

Joseph F. Berger — *NIKO KAJ NINA* — Postkursa legolibreto originala. — Eldonejo de Limburger Vereinsdruckerei GmbH, Limburg/Lahn, Germanujo. 1 vol. broŝ 70 p., 19 x 12 cm., 15 belaj bildoj. Prezo 2,40 germanaj markoj + 10% por sendkostoj.

Ĉi tiu bela romaneto, iom pli ampleksa kaj lukse prezentita, memorigas nin

pri «Karlo», de Privat, aperinta en 1909 kaj ĝis nun ĉiam represata en diversaj landoj, inkluzive de Brazilo, kie ĝi jam elĉerpis grandan eldonon, kaj baldaŭ aperos denove. Espereble ankaŭ «Niko kaj Nina» havas antaŭ si longan mision, ĉar ĝi estas tre talente verkita, en bonega stilo, kaj helpas al «*Fundamento de Esperanto*» teni ĉiam la unuecon de nia lingvo.

Preskaŭ nenion oni povus konsili por plibonigi ĝin; sed mi penu iel kunlabori kun la aŭtoro kaj eldonistoj.

Pĝ. 11: La vorto *brikedo* ne aperas en la «Plena Vortaro», kie kun la sama senco aperas «*briketo*», ne tiel bona vorto; tial mi konsilus meti *brikedon* en la liston de pĝ. 69-70, kun klarigo pri la sufikso *ed*, kiu aperas simile en «*bankedo*» k.a.

Pĝ. 25-6: «ili elkuris la ĉambron». Tre malbona frazo, ĉar la akuzativo en E. montras celon de movo, tial la devenon ni ne povas montri ankaŭ per akuzativo. Korekte estas: «ili kuris el la ĉambro.»

Pĝ. 36: «La siatempe je Kristnasko donacitaj glitiloj...» taŭgas en germana lingvo; sed en Esperanto oni povus redakti simple, ekz: «la glitiloj iam donacitaj al ili je Kristnasko...»

Pĝ. 45: 8-a linio: Ŝia fratino. Korekte estus *Lia* fratino (fratino de S-ro Voroŝ). 19-a linio: sia havaĵo. Korekte estus: *lia* havaĵo. La frazo estas: «... troviĝis ankaŭ la ĉefa parto de *lia* havaĵo».

Pĝ. 53: tiu estis... Korekte: tiu ĉi estis...

Pĝ. 60: ĉiuja (ĉiujn).

Nur tiujn ĉi bagatelojn mi konsilus korekti por estontaj eldonoj. Sed eĉ antaŭ ol fari tiujn ĉi korektojn la

libro estas bonega kaj mi nur deziras vidi ĝin tiel disvastigita kiel «Karlo», de Privat.

Osada Arata — INFANOJ DE L'ATOMBOMBO — Alvokas Ge knaboj de Hiroŝima. Resume tradukis Kansai-Ligo de Esperantaj Grupoj. — Eldonis Japania Esperanta Librokooperativo, 72 Kitaoogimaĉi, Kita-ku, Osaka, Japanujo. 1 vol. 10-paĝa, 18,5 x 12,5 cm. 10 terurigaj bildoj. Prezo Cr\$ 20,00 en la Libroservo de B.E.L.

La libron verkis dekoj da knab(in)oj el la lernejoj de Hiroŝima, kiuj suferis la teruraĵojn de la atombombo en la 6-a de Aŭgusto 1945, kaj nun donas al la mondo siajn impresojn en mallongaj raportoj, kiujn tradukis 50 esperantistoj kaj esperantistinoj.

La celo de la libro estas malamigi la militon (ne Usonon) kaj amigi la pacon; sed la trista memoro pri tia monstraĵo, simile al la kruelaĵoj de Josuo, eterne vivos en la Historio de la Homaro kaj vipos la respondecajn homojn, kiuj neniam trovos savon. Felice, tiuj prirespondaj homoj estas nur areto, ne la usona popolo.

Post la falo de la atombombo, la domoj disfalis kaj la granda urbo kun 250.000 loĝantoj rapide bruladis. Tujtaj amasoj da grave brulvunditoj, formataj de viroj, virinoj, infanoj, nudaj aŭ kun kelkaj duonbruligitaj ĉifonoj sur la korpo, la haŭto disfalanta, la korpo kovrita per sango kaj ulceroj, pelataj de kruelaj doloroj kaj timego, frenezigantaj sub kriegado, sin ĵetadis en la riveron jam plenan de monstraj kadavroj!

La «Infero» de Dante Alighieri estas pala fantazio kompare kun la suferigo de tiu kompatinda loĝantaro.

Sed la malsanoj pro la atombombo daŭrigas ĝis nun la mortigadon de la postvivintoj. Sed tamen restis postvivantoj por rakonti al la homaro, kio estas la atombombo.

Ok jaroj jam forpasis. La tiamaj knaboj kaj knabinoj jam estas nun studentoj en universitatoj, kaj dum la vivo propagandos tra la mondo kontraŭ la kruelaĵo.

Ĉiu konscia homo devas legi tiun libron.

Jack London — LA BALENDENTO — el la angla tradukis William Auld. — 12-paĝa broŝ. 18 x 12 cm. — Eldonita de F. Maitland, 22 Hamilton Park, London, N. 5.

Ĝi estas rakonto pri misiisto mangita de kanibaloj. Tre banala historieto plena de barbaraj vortoj nekompreneblaj. Ĝin savas nur la nomo de la tradukinto, ĉar William Auld estas la genia poeto, kiun la tuta Esperantistaro adoras. Al li ni ŝuldas cent paĝojn el la monumenta verko «Kvaropo»; nur tial oni paciencu kaj legu la verketon de Jack London.

I. G. B.

**SERVIÇO DE LIVROS
DE B. E. L.
PEÇAM CATÁLOGO**



O ESPERANTO NO ESTRANGEIRO



ARGENTINA — Deve reunir-se em Bahia Blanca, de 2 a 5 de Abril, o VII Congresso Argentino de Esperanto.

AUSTRIA — A Sociedade dos Professores de Esperanto da Áustria dirigiu um apelo às Organizações de Jovens da Cruz Vermelha, de 32 países, chamando a atenção para as enormes vantagens do Esperanto para fins da Cruz Vermelha, e para a resolução da V Conferência da Comissão de *Junulara Ruĝa Kruco*, em Genebra, em Dezembro de 1951, para que as Secções de cada país experimentem novos métodos para a correspondência entre os grupos dos diversos países.

ESPAÑA — De 29 de Março a 4 de Abril teremos em Barcelona a Semajno Esperantista, com uma exposição e um curso de Esperanto.

FRANÇA — O 45.º Congresso da *Union Espérantiste Française* terá lugar em Auxerre (Yonne), de 23 a 25 de Maio. O programa é convidativo.

HOLANDA — Segundo resolução de U.E.A., o 39.º Congresso Universal de Esperanto será em Haarlem, cidade de 150 mil habitantes, próxima de Amsterdam. Haarlem é a cidade das flores.

IUGOSLAVIA — O Esperanto está sendo ensinado em 20 escolas, com milhares de alunos. Três novas sociedades esperantistas acabam de ser fundadas. Isto mostra o interesse que despertou o Esperanto no culto país onde se realizou em breve o Congresso Universal de Esperanto, de 1953.

SUÉCIA — Funcionam actualmente em todo o país 66 cursos de Esperanto. O Congresso da *Sveda Esperanto-Federacio* realiza-se em Abril, em Halmstad.

SUIÇA — A revista mensal *Die Reise*, de Zurich, que insere sempre notícias sobre o Esperanto, trouxe no número de Novembro último um artigo intitulado "Es-

peranto parolata", com informações sobre o movimento esperantista.

— A saudação em Esperanto ao Brasil, irradiada pela Rádio de Ondas Curtas Suíça, de Berne, no dia 31 de Janeiro, foi ouvida e apreciada por muitos esperantistas brasileiros, em diversos pontos do país. Da Baía e de Belo Horizonte soube-mos, por comunicação das sociedades esperantistas locais, terem sido nítida, perfeitamente ouvidos os termos da saudação e o hino esperantista.

C. C.

TABELA DE QUOTAS

Em consequência da grande alteração havida no valor do cruzeiro foi necessário fazer uma revisão na tabela de quotas, conforme verão os leitores na Secção respectiva, página 2.

Todos sabem que, recebendo as contribuições na moeda no país, não é nessa mesma moeda que fazemos na Universal Esperanto-Asocio as inscrições dos sócios, ou pagamos às editoras os livros importados.

Não se trata, portanto, pròpriamente de uma majoração das contribuições, mas simplesmente de novo cálculo baseado no câmbio actual. U.E.A. e B.E.L. nada receberão a mais em virtude desta revisão.

Não temos dúvida que os nossos prezados consócios de boa vontade concordarão em completar a quota já paga, remetendo-nos a diferença, o que de antemão agradecemos.

Bibliografio



JARLIBRO DE U.E.A. 1953 — Unua parto — Neaĉetebbla, sed ricevebla nur de Individuaj Membroj de Universala Esperanto-Asocio. Krom la kutimaj sekcioj pri Akademio, Honoraj Prezidantoj, Honora Membraro, Dumviva Membraro, Delegitoj, Librolisto, Listo de Eldonejoj, Universalaj Kongresoj, Fakaj Asocioj, k.a., ĝi donas la Arangojn Esperantistajn en 1953.

Utila kaj havinda konsultlibro por la Esperantistaro.

LAGO DE COMO — Esperanta faldfolio kaj mallonga gvidlibro pri la ĉarmaj restadejoj kaj ĉefaj turismaj lokoj de la lago de Como. Reeldono plibonigita de *Ente Provinciale per il Turismo*. La belaj vidaĵoj, kiujn montras la eldonaĵo, certe vekos la deziron al multaj samideanoj ĉeesti la 25-an Nacian Kongreson de la Italaj Esperantistoj, kiu okazos en Como, de la 5-a ĝis la 8-a de Septembro 1953. Senpaga eldonaĵo estas sendita al ĉiuj kiuj ĝin petas al *Ente Provinciale per il Turismo*, Piazza Cacciatori delli Alpi, Como, Italujo.

FLORBULBOJ, ANKAŬ EN VIA ĜARDENO! — Hiacintoj, tulipoj, narcisoj, krokusoj. Prospekto ilustrita, eldono de Centraal Bloembollen-Comité, Wilhelminastraat 13 rood te Haarlem, Nederland (Holanda).

FOIRO DE PADOVA SPECIMENA INTERNACIA. Fondita 1919 — Prospektoj, ĝenerala plano kaj granda bela afiŝo pri la tradicia foiro, kaj resuma historio pri tiu itala urbo. La 31-a Internacia Foiro okazos dum Junio 1953.

BRUGGE — LA ARTJUVELO DE BELGUJO — Ilustrita prospekto kun priskri-

boj kaj bildoj, eldonita de *Urba Servo por Turismo* — Dijner 16, Brugge, Belgujo.

SPA, BELGUJO — Aparte presita verkaĵo pri Spa, centrò de belega regiono, kun ĝiaj tablo-akvoj tutmonde konataj.

GUSTAVO VIANA — *Zamenhof e a sua lula* — Broŝureto enhavanta la parola-deton faritan ĉe Rotary Clube de Santo Amaro, Ŝtato Baía, de nia samideano, delegito de U.E.A. en Santo Amaro.

KAJERO 151 — Eldonata de "Sukro", en la Sendependa regneto, "K" (Utopia Preternacio Konstancia) ĉe Cambridge St.: Willoughby, S. W. Aŭstralio. Okt. 1952.

SVEDA SOMERA SEMAJNO — En Frostavallen, Hoor, Svedujo, 9-16 Aŭgusto 1953. Temo: Internacia Kulturinterŝango — Prospekto, kun plano pri Frostavallen.

AŬTO-PRAMSIPO — Fredrikstad, Larvik, Frederikshavn. Prospekto kun tabelo de veturoj, 1953.

ESPERANTA LEGOLIBRO

Por Elio Migliorini

3.^a edição — Inteiramente revista
— Aumentada

I parte — Tra la Vivo

II parte — Tra la Lingvo

III parte — Tra la Literaturo

Um guia seguro e atraente para o estudo do Esperanto

Cr\$ 35,00

Libroservo da B.E.L.

LA XXXVI.^a DATREVENO

DE LA MORTO DE L. L. ZAMENHOF

(14.4.1917 — 14.4.1953)

Per siaj ĉiam vivantaj verkoj geniaj mortintoj daŭre gvidas la vivantojn. Tiun ĉi penson bele esprimis Aŭgusto Comte jene: «La vivantoj estas ĉiam pli kaj pli forte regataj de la mortintoj.»

En la nuna generacio de esperantistoj estas miloj da gejunuloj naskitaj post la morto de Zamenhof, kiuj tamen obeas la vokon de tiu glora mortinto.

La plej eminentaj majstroj de nia lingvo, kiaj estis Bourlet, Grabowski, Grosjean-Maupin, ankaŭ mortis, sed per siaj verkoj ili daŭrigas la instruadon de la lingvo kaj diskonigon de la ideo.

C. Bourlet mortis antaŭ 40 jaroj, sed per la libreto anonima *Primeiro Manual de Esperanto* li plej vigle instruas Esperanton en Brazilo, Francujo k.a. landoj.

Zamenhof mortis antaŭ 36 jaroj, sed liaj verkoj restas la modeloj de stilo tra la tuta mondo; *Fundamento de Esperanto* estas respektive obeata de ni ĉiuj.

Tiu aro da obeataj mortintoj kreskadas kun ĉiu jaro por la esperantistoj kaj ĝuste tial nia movado atingis senmortecon: ĝin jam gvidas senmortuloj.

IGOBO

NEKROLOGO

CELSE DE FARIA ESTON

Forlasis ĉi tiun mondon nia samideano Celso de Faria Eston, batalanta esperantisto, kasisto de la Esperanta Societo de Pelotas. Li estis patro de nia amiko Boris Eston, al kiu ni kondolencas.

D-ro ALBERTO PORTO DA SILVEIRA

Mortis en ĉi tiu ĉefurbo la konata ĵurnalisto kaj verkisto Alberto Porto da Silveira.

Talenta oratoro, li aktive partoprenis en la VII-a Brazilia Kongreso de Esperanto, farante vibrantajn paroladojn, kiuj entuziasmigis la kongresanojn.

Prof. D-ro TEOBALDO RECIFE

La 11-an de Februaro forpasis en ĉi tiu urbo nia klera samideano Teobaldo Recife, kiu dum multaj jaroj estis konsilanto de la veterana Brazilia Klubo Esperanto.

Advokato kaj inĝeniero, li estis poligloto, flue parolante plurajn lingvojn, inter ili Esperanton. Li ankaŭ estis instruisto ĉe la Instituto de Edukado, la kolegio Petro II kaj aliaj lernejoj.

LIVRARIA ACADÉMICA

Rua Miguel Couto, 49 —
Rio de JaneiroGramáticas e Dicionários em várias
línguas para o estudo do Esperanto

MIKSAJOJ

KONDUTO PRI LA VIVO

D-ro Leonel Gonzaga

Mi neniam ambiciis ion ajn superan al tio, kion mi povus atingi. Efektive, mi ne komprenas la vivon kiel alvenpunkton, al kies konkero ni strebu, eĉ kun ofero de sano aŭ de la propra ekzistado.

La vivo estas ĉio: la rimedoj kaj la celado. Oni klopodu preparante la estonton, sed oni serĉu feliĉon en la laboro.

La homo ne devas vivi nur metante esperon sur estontan ĝuon; li devas peni por trovi, dum siaj klopodoj, la agrablan flankon, kiu mildigu lian streĉan vivbatalon.

Anstataŭ vivi esperante, oni esperu vivante.

Trad. Kotinju

PRIPENSOJ

Ne plendu pri via epoko: se vi konscias, ke ĝi estas malbona, demandu vin, kion vi faris por ĝin plibonigi.

T. Carlyle

La kialo de ĉiuj niaj mizeroj estas la egoismo sub ĉiuj formoj.

J. Jaurès
(El «Svisa Espero»)

La patriotismo ne estas la malamo kontraŭ aliaj popoloj, sed la amo al la propra popolo.

Rosegger

DIFINO

NENIO estas tranĉilo sen tenilo, kiu jam de longa tempo estis perdinta la klingon.

Du frenezuloj renkontiĝas kaj interparolas:

— Nu, kion vi faras nun?

— Ha, ĉu vi ankoraŭ ne scias? Nun mi estas inventisto.

— Brave! Kion vi jam inventis?

— Novan tipon de alumetoj.

— Ĉu vere? Kiamaniere ili estas?

— Ili similas al la aliaj, sed mi enkondukis grandan novaĵon: ili havas la kapon sur la alia ekstremaĵo.

K.

SOMERA KANTO

(Kun pardonpeto al la memoro de P. Verlaine)

La kolortonoj
de l'akvomelonoj
de l'somero
logas, incite,
en korinvit-
maniero.

Okulavide,
ruze, perfide,
serĉas mi,
per bona ŝanco,
pli grandan tranĉon
alpreni.

Kvazaŭ pro spito,
for l'apetito!
— Vermduono
(Ŝajnas fabel'!)
elrampas el
l'akvomelono!

Kiŝoto.

LA BOVO

G. Carducci

Vin, pia bov', mi amas. El vi sento
De paco fluas, kaj de fort' impona.
Solene gardas, kvazaŭ monumento,
Vi sur libera kampo fruktodona.

Sub jug' vi kiel sekvas en kontento
L' ageman homon kun grav' monotona!
Tolere turnas al li en silento
L' okulojn pacajn post la bat' admona.

Tra l' naz' humida, nigra, vastatraua,
La spiro fumus; kvazaŭ himno pia
La muĝ' perdiĝas en aer' serena;

En via milda, grava, verdeblua
Okul' spegulas sin la granda, dia
Kvieto de la verda kamp' ebena.

Trad. K. Kalocsay — *Eterna Bukedo*
(El «La Rondo», Marto 1949)

EPITAFIO

(Sur mia tombo)

Haltu por unu moment' kaj vidu pa-
santo honesta:
Tie ĉi pace sub kruc', sub marmorta-
bulo premanta
Kuşas restaĵo de l' hom'. Li estis, dum
vivas, modesta,
Tamen fervore ĝis fin' laboris li por
Esperanto.

M. Soloviev

KONFESO

Mi havas amatinon. Vi povas ima-
gi, kiel malfeliĉa mia edzino estas pro
tio. Mian tutan liberan tempon mi dedi-
ĉas al tiu belega amikino. Ĉiutage
ŝi denove enflamigas mian koron. Ve-
kiĝante mi pensas pri ŝi, dormirante
mi sentema flustras ŝian nomon. Mul-
te da horoj mi pasigas kun ŝi dum la
tago, kaj ni ofte restadas kune dum
duonaj noktoj. Mi preskaŭ neglektas
mian laboron kiel verkisto. Tamen es-
tas precipe ŝi, kiu instigas min per no-
vaj ideoj, kaj al ŝi mi ŝuldas dankon
pro multaj sagacaj inspiroj. Ŝi estas
mia muzo, mia feino, mia reĝino.

Ne supozu, mi petas vin, ke ŝi es-
tas malmorala fivirino. Ŝi vere estas
karaktera, virta kaj modesta. Vi devus
aŭskulti ŝin. Kia belsonco! Oni devas
ami ŝin. Vi devus konatiĝi kun ŝi. Vi
estus tiel entuziasmata kiel mi estas.
Aŭ... ĉu vi eble jam iam renkontis ŝin,
mian amatinon, la mondhelpingvon
Esperanto???

Eugen Unger (Memmingen)

ANONCETO

Dana teksinĝeniero, 34-jara, eksperto
pri racionalismo (Methods Time Measure-
ment), teksilteknikisto (lano), deziras la-
boron en Sud-Ameriko, kaj korespondi kun
teksinĝenieroj en Sud-Ameriko. Respondoj
en Esperanto, angla, germana aŭ hispana
lingvoj — Inĝ. Verner Jensen — Blomme-
lundsgatan 3 B, Norrköping, Sverige (Sue-
cia).

BABLEMULINA PORTRETO

Oni rakontas la jenan historion pri la germana artpentristo Menzel: Iun tagon, kiam Menzel sidis en restoracio por tagmanĝi, eniris sinjoro kaj sinjorino kaj okupis tablon vid-alvide al li.

La sinjorino estis tre babilema, kaj ĉar ŝi parolis tre laŭte, Menzel ne povis eviti aŭdi preskaŭ ĉion, kion ŝi diris, kvankam ne estis lia kutimo kaŝe aŭskulti interparoladon de aliaj.

La paro ŝajne vizitis ekspozicion de pentraĵoj, kaj ŝiaj stultaj komentoj rilate verkojn kaj artistojn multe ĉagrenis la faman pentriston.

Poste ŝi ekkritikis la gastojn ĉe la aliaj tabloj, kaj kiam ŝi fine mallevis la voĉon ĝis flustro, samtempe malice rigardante al li, Menzel komprenis ke nun li estas la objekto de ilia klaĉado.

Trankvile li prenis sian skizlibron el la poŝo kaj komencis desegni en ĝi, foje sendante rigardon al la sinjorino.

Ne daŭris longe antaŭ ol la sinjoro abrupte leviĝis, firme paŝis al la artpentristo kaj kolere diris:

«Sinjoro, mi malpermesas al vi desegni mian edzinon. Mi ne volas, ke vi ĉirkaŭkuru kun ŝia portreto en la poŝo».

Responde, Menzel transdonis al li sian skizlibron, dirante en sia plej nai-va tono:»

«Ĉu tiu ĉi povas esti portreto de via edzino?»

De la folio rigardis lin malinteligenta ansero.

(El «Dansk Esperanto-Blad» jul-aŭg. 1952).

ANONCETOJ


— VOJTECH VOZNICA, 17-jara studento, deziras interŝangi ilustritajn poŝtkartojn kaj diversajn bildojn: Ruĝa Placo, n. 30, Ĉeĥoslovakujo.

— VOJTECH VRBA, 17-jara studento, deziras interŝangi bildkartojn: Monchnice, n. 39, p.p. Koryčany, Ĉeĥoslovakujo.

— SIMO RAUMAVIRTA, 20-jara, letere aŭ bildkarte. Adr.: P. Rautatienkatu, 15. A.5., Helsinko, Finnlando.

CARLIER FELIX, 33 rue Rosée, Rongy-Hainaut, Belgujo, deziras korespondi kun brazilaj gesamideanoj, ĉefe kun kafokulturisto.

— Mi deziras interŝangi bildkartojn kaj leterojn kun ĉiuj gesamideanoj. Adr. JUNZO IHESITA, N° 3, Taĉibanadori — C, Nisinariku, Osaka, Japanujo.



EMBLEMAS

ALFINETES

	Cr\$
1. Estrela sobre fundo branco	12,00
2. Estrela com a letra E	15,00
3. Estrela sobre fundo branco com a palavra «Esperanto»	15,00

BROCHES

4. Estrela como o N. 3	15,00
5. Estrela	15,00

Abatimento para quantidades

SERVIÇO DE LIVROS DA B. E. L.

CONCURSO NACIONAL DE 1952

Publicamos o resultado do Concurso entre as instituições filiadas no ano próximo findo:

	1951	1952	%
1. E.R. Olaria	9	23	255
2. Verda Stelo E.G.	45	108	240
3. S. Mineira E.	140	294	210
4. E.S. São Leopoldo.	47	94	200
Ceará E.K.	5	10	200
5. A.E. Rio Janeiro.	86	165	191
6. G.E. "F.V. Lorenz"	19	33	173
7. E.G. Barra Mansa.	30	50	166
8. E.K. Zamenhof.	35	57	162
9. G.E. Baía.	132	196	148
10. G.E. Limoeiro Norte.	41	56	136
11. Paraná E. A.	38	48	126
12. E.K. Macaé.	41	47	114
13. G.E. Amazonas V. Stelo	10	10	100
14. E.S. Porto Alegre.	263	261	99
15. C.E. Juiz de Fora	114	110	96
16. Pernambuka E. A.	120	109	90
17. G.V.St. Santanésia.	45	40	88
18. Uberlândia E.K.	46	40	86
19. G. E. Bauru.	95	80	84
20. Brazila K.E.	1.132	790	69
21. C.E. Santos.	200	112	56
22. E.K. ĉe A.C.M.	60	20	33
23. A. Potiguar E.	73	21	28
24. Tabajara E.K.	81	20	24

C.E. Gramberyense	—	—	—
G.E. Inst. M. Valfredo	—	—	—
E. K. Campina Grande	—	—	—
C.E. Cabo Frio.	—	—	—
Sorokaba E.K.	—	—	—
Itajubá E.K.	—	95	—
C.E. Niterói	—	73	—
E.S. Pelotas	—	34	—
G.E. Emanuel.	—	30	—
Kristana E.K.	—	29	—

Ourinhos E.A.	—	20	—
E.R. Torquato Severo	—	19	—

Total de pontos em 1952 3.094

Apresentamos as nossas congratulações às instituições vencedoras, que são as três primeiras colocadas. A 1ª tem sede no Distrito Federal, a 2ª em Baturité, no Ceará, e a 3ª em Belo Horizonte. Elas receberão para a sua biblioteca livros em importância correspondente a 10% da contribuição que efectivamente pagaram.

Tendo o Brasil obtido no Concurso Internacional 7.093 pontos, verifica-se que as instituições filiadas, contando juntas 3.094 pontos, contribuíram com 43% daquele total. Essa percentagem oferece sem dúvida possibilidade de ser fortemente melhorada, o que esperamos seja feito para assegurar a posição que o movimento brasileiro conquistou no mundo esperantista.

As instituições que trouxeram maior contingente à nossa vitória foram:

Brazila Klubo Esperanto, Rio de Janeiro	790
Sociedade Mineira de Esperanto.	294
Esperantista Societo de Porto Alegre	261
Grupo Esperantista da Baía.	196

ANONCETO

Mezalta 45-jaraĝa fraŭlo entuziasma esperantisto serĉas tiun samentuziasman samideaninon kun kiu estos pova ne nur interkorespondadi; sed krei ian belan. Plifavordona se vi parolas eĉ la lingvon anglan kaj havas ian fakon. Respondon mi atendas je la adreso:

S-ro Georgo Hrotkó — Rua Cons. Când. de Oliveira, 124 — Vila Anastácio — São Paulo (Capital).